

Bulgara **ESPERANTISTO**



deziras korespondi

Bulgario

Angelina Ĥr. Japarĝieva — „Orfej“ — 3, vĥod III, ap. 37, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Danka Marinova Jankova — ul. Timok 87, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Ilijana Jankova Ilieva — „Orfej“ — 2, vĥod II, ap. 44, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Mara Kostova Vasileva — ul. Partizanska 80, vĥod III, ar. 39, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Nikolaj Atanasov Nestorov — ul. Partizanska 78, vĥod II, ap. 12, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernanto — bk, pm, insignoj).

Slavejka Dimitrova — ul. Partizanska 80, vĥod A, ap. 27, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Tonka Iv. Stojanova — ul. Partizanska 78, vĥ. A, ap. 9, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Petronka Pileva Vâlkanova — ul. Georgi Ĥirkov 90, vĥod 3, ap. 19, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Instruistinoj dez. korespondi tutmonde pri ĉt. Komuna akreso: Uĉiliŝte „Georgi Dimitrov“, S. Tareva — uĉitelka, *Targoviŝte*.

Maria Iv. Djankova — ul. Napoja 9, 7100 *Bjala* (presistino — kun ĉl pri ĉt).

Ivan P. Severnjaŝki — ul. Benkovski 17, 7100 *Bjala* (presisto — kun ĉl pri ĉt).

Ivan G. Vârbanov, ul. Dragoman 7, 7100 *Bjala* (presisto — kun ĉl pri ĉt).

Danka Anđelova Krâsteva — ul. Benkovski 28, 7100 *Bjala* (presistino — kun ĉl pri ĉt).

Galja Markova — ul. Avrora 31, 7800 *Popovo* (lernantino — kun ĉl pri ĉt).

Angel Prokopov Ŝiŝev — 2830 *Katunci*, Blagoevgradsko (27-jara horloĝisto — kun ĉl pri ĉt).

Ĉeĥoslovakio

Junaj esperantistoj dez. korespondi kun ĉl pri ĉt. Komuna akreso: E-rondo SZK Rostex Viŝkov apud *Brno*, str. Havliĉkova.

Pollando

Stanislav Wolosz — 07-421 *Olszewka*, voj. Ostvolska (25-jara — pri literaturo, foto, Esperanto, bk, pm, moneroj).

Jolanta Seweryn — *Krapkowice* 3, ul. Krasickiego 5/83, 47-303 Pollando (18-jara — kun bulgaraj esp-toj pri kino, muziko, teatro, sporto, Esperanto).

Zofia Plichta — 80—227 Gdansk — *Wrzeszcz*, ul. Hibnera 34 (20-jara — sporto, turismo, prospektoj, bk).

Agneska Talarcyk — ul. Kurpinskiego 2, 64—100 *Leszno* (19-jara — sporto, muziko, filmoj, bk).

Tereza Bieĉrava — 32—410 *Dobĉice*, ul. Rinek 32, voj. Krakovo (15-jara — Esperanto, teatro, kiro).

Ewa Szimanska — ul. Sulkowskiego 46/24, 85—642 *Bydgoszcz* (21-jara — bk, muziko, filmoj).

Tadeusz Figurski — Zeromskiego 3, 05—120 *Legionowo* (13-jara — historio, sporto, filatelo ktp).

Beata Bieniek — Przemyslow 4, 99—441 *Zladow Koscielny*, voj. Skierniewice (kun gejunuloj pri naturo, muziko, foto, teatro).

Stanislawa Topa — 53—307 *Wroclaw*, ul. Kamienna 35/37, DS „Przegulowiec“ (21-jara — studentino — kun ĉi pri literaturo, moderna muziko, sporto, turismo, bk, mod. revuoj, gram. diskaj).

Edvard Drozd — ul. Orzeszkowej 9 e/11, 83—110 *Tcew* (14-jara — kun samaĝuloj).

Barbara Czepiel — ul. Barska 57/3, 30—307 *Krakow* (16-jara).

Sovetunio

Belajeva Anna Markovna — 720 064 *Frunze* — 64, 3 mikrorajono 18—20 (23-jara instruistino en muziklernejo — kun ĉl pri ĉt).

Vilius Rauduve — Pasvalio raj., *Daujenu p-tas*, Girsudu km, Litovio (22-jara — kun junuloj pri muziko, naturo, studenta vivo).

Vilhelmas Randus — 233018, *Kaunas* — 18, Vistyĉio 20, Litovio (18-jara — kun ĉl pri ĉt).

Eugenia Riburieve — N. *Vilnia*, Gerovs 9—38, Litovio (25-jara flegistino — kun ĉl).

Esperanto-rondo, — ul. Barrikad 126—4, *Kaluga* — 16 (kun ĉl pri ĉt).

Kaŝicina Larisa — *Ivanovo* — 14, domo 200 kv., 43 (lernantino en la 8 klaso — kun geknaboj tutmonde).

Lebedeva Ira — *Ivanovo* — 24, ul. Kalaŝnikova, dom 56, kv. 2 (en la 8 klaso — kun ĉl).

Leo Teder — Nomme Sovhoos, 203 622 *Kilingi* — Nomme, Estonio (bk kaj pm je temoj pri floroj, faŭno, sporto, pentraĵoj, kosmo).

Hmeljova Nina — 617070 *Krasnokamsk*, ul. Ĉapaev 55—49 (19-jara — kun ĉl pri ĉt).

Mamleeva Rajla Ŝĉakirovna — Sovetunio 614052, *Perm*, ul. Kalinina d. 29—10 (mezaĝa advokatinino — kun ĉl pri ĉt).

Puzirjova Ljuba — *Omsk* — 644030, ul. Sportivnaja dom 19 (studentino de juro — pri literaturo, juro kun Pollando, GDR, FRG).

Raja Zaharĉenko — *Omsk* 644063, ul. 20 let RKKA, dom 246, kv. 4 (studentino de juro — kun ĉl — pm, insignoj, poŝkalendaretoj, stenografio, muziko, turismo).

Sergo Kostih — *Omsk* — 644020, ul. Irĉiŝskaja nabereĝnaja 48, kv. 112, (studento de juro — kun ĉl pri ĉt).






La kapoj kaj la E-fliago klingas estime
antaŭ la memoro pri la karaj pereintoj en la
kontraŭfaŝisma batalo



Ripoze

Denove en nobla laborado



ENHAVO

* * * La Julia Plenkunsido de CK de BKP kaj ri	1
Todor Dimitrov. III Internacia Arkeologia E-peranto-Brigado „D-ro L. L. Zamenhof“	2
M. D. La Se a FIER	3
S. Konjarski. En la Teksa Teknikumo en Vraca	3
Nedko Georgiev. Kamarada helpo al espe- rartisto	3
Cvetana Uzunova. En la instrubazo apud Drujevo	4
Konferencano. La Se a MEM-Konferenco	4
Saulcerite Neilande. E-peranto-arango en Riga	5
Katia Maneva. La greka postkongreso .	5
Vladimir Ĵelev. La 44-a kongreso de LIBE	6
Demeter Kalman. Leĉero al la reakcio de „Bulgara E-peranto“	7
Nadja Andrianova. Ĝis revido, Bulgario!	7
A. Harkovskij. Interjuo kun ĉ-ro Ma- gomet I aev: „La ligva bariero. Kiel veki ĝin?“	8
Violin Oljanov. La arto traŭki	10
Prof. Walter Bartel. La murco de Ernst Thälmann, la gvidinto de la Ĝermara KP	15
Elvira Lippe. Mia stelo	III
* * * La homa korpo	III
* * * Deziras korespondi	16
* * * Tra la gazetaro	IV

Sur la kovrilpaĝo:

E-peranto kaj la laboro ligas nin en la
batalo por pli feliĉa mondo.

Paropreman'oj en la Internacia Arkeologia
E-Brigado „D-ro L. L. Zamenhof“ (ĉe
maldekstre): Koloŝa Tamas — Budapeŝto,
Venera Kalčeva — Veliko Târnovo, Bul-
gario, Ivan Koroľov — Bijk, USSR,
Jerzy Poslušny — Wrocław, Pollando, Zdenka
Holova — Ostrava, ĈSSR, Peter Granam
Newell — Londono.

Redakta Komitato: Kuĉo VÁLEV (ĉefre-
dak'oro), Nevenka ALEKSIEVA, Ĥristo GO-
ROV, A en GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA,
Nedko JONKOV, Krăstju KARUCIN, Haim
LEVI.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝkesto 66

Tel. 31-00-29



LA JULIA PLENKUNSIDO DE CK DE BKP KAJ NI

En julio ĉi-jare en la vivo de nia lando okazis grava politika evento — la Julia Plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio. Per siaj decidoj tiu Plenkunsido foliumis novan paĝon en la analoj de la socialisma konstruado.

Okazinta nelonge post la XI kongreso de la Partio, kiu starigis la strategian sloganon „Efektiveco kaj kvalito — kvalito kaj efektiveco!“, la Julia Plenkunsido traktis akre aktualajn problemojn kaj prenis gravajn decidojn lige kun ili. Tiuj decidoj tuŝas la tutan laboron kaj batalon de la bulgaraj laboruloj — kaj la bazon, kaj la surbazon, kaj la stilon de laboro, kaj la edukadon de la kadroj, kaj la moralajn faktorojn kaj aspektojn en la vivo de ĉiu, kaj la tutecan ekonomian kaj socialan disvolviĝon de nia socio. La Plenkunsido substrekis, ke nun ege grava estas apliki konsekvence la Lenin-principojn en la laborado kaj en la ĉiufanka vivo de la lando, labori ankoraŭ pli aktive kaj sindone, kun ekskluzive alta disciplino kaj granda respondeco antaŭ la estonto de socialisma Bulgario. La Plenkunsido akcentis antaŭ ĉio sur la malperfektaĵojn kaj la mankojn ĉe la solvo de la problemoj kaj montris la vojon por ties definitiva forigo — por garantii ankoraŭ pli rapidan evoluon antaŭen. Aparte grandan signifon ekhavas la demando pri proklamo de tutpopola batalo kaj kreo de atmosfero de netoleremo kontraŭ neglekto kaj rompado de la Lenin-principoj de mastrumado kaj de niaj legoj; kontraŭ ĉia malŝparado de laboraj, materialaj, valutaj kaj financaj fontoj, por severa reĝimo de ŝparado en ĉiuj branĉoj; kontraŭ senmastreco kaj misuzo de socia havaĵo; kontraŭ senfareco, salajra egaligo kaj konsumalpaŝo ĉe la efektivigo de la sociala politiko.

Akre, klare kaj kree estis starigitaj la problemoj, kiuj devenas el la nuna etapo de konstruado de matura socialismo en Popola Respubliko Bulgario.

La Julia Plenkunsido starigis la taskon ŝanĝi la stilon kaj la metodojn de laboro, krei pli altan disciplinon kaj respondecon en ĉiuj sektoroj de nia ekonomia kaj soci-politika vivo. La Plenkunsido enportis spiriton de kritikemo kaj memkritikemo, de rekta enigo de la fingro en la vundon, de Lenin-netoleremo al malperfektaĵoj kaj mankoj. La tuta popolo estas alvokita al decida batalo kontraŭ la leĝrompantoj kaj malŝparantoj de la socia havaĵo, kontraŭ tiuj, kiuj facilanime misuzas la popolan monon, kiuj estas rompintaj sian senton de respondeco kaj provas meti sian etan personan bonfarton pli alten ol la socia bono, ol la intereso de la socio. La Partio vokas al batalo kontraŭ la malbona spirito de la senrespondeco, ke oni ekbruligu neniigan fajron kontraŭ ĝin ĉie, kie ajn ĝi kaŝas sin en nia vivo. Do, en la nomo de tiu ĉi tasko oni devas mobilizi ĉiujn fortojn, funkciigi la tutan mekanismon, pri kiu la laboruloj disponas.

La bulgaraj esperantistoj renkontas kun aprobo kaj plenkonto la decidojn de la Julia Plenkunsido. Laboramaj civitanoj kaj patriotoj de la socialisma patrolando, ili kiel unu homo ekstaras ĉe tiuj decidoj. Ĉar temas pri iliaj intereso, pri iliaj rajtoj kaj devoj esti partoprenantoj en la efektivo de la projektoj de la Plenkunsido — plua disvolviĝo kaj konkretiĝo de la decidoj de la XI-a partia kongreso.

La Bulgara Esperantista Asocio ankaŭ estonte strebos al plibonigo de sia tuteca laboro. Ĝi plue helpas la edukadon de ĉiu bulgara esperantisto — produktanto en entrepreno aŭ en agrara-industria komplekso, agronomo, inĝeniero, fervojisto, poŝtisto, ĵurnalisto, sciencisto, instruisto, lernanto kaj studento, kuracisto kaj juristo — esti posedanto de altaj moralaj kaj civitanaj virtoj, esti ekzemplo estiminda kaj imitinda pro siaj faroj kaj intencoj, pro sia tuteca konduto.



III INTERNACIA ARKEOLOGIA

ESPERANTO-BRIGADO

„D-RO L. L. ZAMENHOF“

8—31 de aŭgusto 1976

Ne malproksime de nia suda urbo Marica sur la natura monteto „Asâra“ iam ekzistis granda urbo — Konstancija. Ĝi estis ĉirkaŭita de dikaj fortikaĵmuroj kaj defendaj turoj. Nun de la urbo restis nur ruinaĵoj.

Por malkovri la sekretojn de la iama Konstancija sur „Asâra“ ĉi-jare laboris pli ol 90 junaj esperantistoj el 9 landoj: Sovetunio, Pollando, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Britio, Belgio, Irano, Bulgario. La laborbrigado estis organizita de BEJ kaj la Distrikta Historia Muzeo en urbo Ĥaskovo kun la helpo de DK de la Bulgara Komunista Partio.

Ĉe la oficiala malfermo ĉeestis multe da urbanoj kaj gastoj el la tuta distrikto. La sekretario de DK de BKP en Ĥaskovo k-do Dinko Atanasov varme salutis la brigadanojn kaj en-

manigis al la ĉefkomandanto Kiril Miluŝev specialan brigadstandardon kun la portreto de d-ro Zamenhof. Post la oficiala malfermo okazis torĉa manifestacio kun prezento de florkronoj antaŭ la frata tombejo de la pereintaj kontraŭfaŝistoj el Marica.

Sub la gvido de la arkeologoj Alaĝov kaj Balabanjan la junaj esperantistoj donis sian kontribuon por plimultigo de la arkeologiaj eksponatoj, por pli plena esplorado de la pasinteco de tiu regiono de antikva Tracio. Ili malkovris restaĵojn de ceramikaĵoj el la Ĥata epoko (800—500 jarojn antaŭ nia epoko) — vazojn malgrandajn kaj grandajn (por greno), kuprajn kaj bronzaĵajn monerojn, ornamaĵojn, fortikaĵmurojn. Estis malkovrita ankaŭ unika tombo de infano en ceramika ujo.

Inter la taĉmentoj de la brigado estis organizita konkurado pri labor- kaj kulturaktivecoj. Plej bone sin prezentis la brigadanoj Ivan Slivov (Bulgario), Jana Ŝolcova (ĈSSR), Jerzy Poslušny (Pollando), Ivan Koroljov (USSR).

La ŝtabo de la brigado kaj la direktorino de la junulara domo en Marica Marija Slavova dediĉis multe da fortoj al organizado de enhavoriĉa kaj kultura ripozo por la brigadanoj. Funkciis parolanta rondo. La brigadanoj pliriĉigis siajn konojn pri la Internacia Lingvo, lernis novajn E-kantojn. Ili gastis al familioj de esperantistoj en la urbo, kelkaj al E-societo „Kolombo de la Paco“ en urbo Gâlâbovo. En la brigado gastis la ensemble por naciaj kantoj „Trakija“ el u. Ĥaskovo, soldata estrada ensemble, estradaj muziktrupoj el Ĥaskovo, Dimitrovgrad kaj Marica. Estis organizitaj projekciadoj de kinofilmoj, vizitoj de disko-teko, vespero de amikeco, karnavalo kun revuo de maskoj kaj kostumoj. Kune kun UK de Komsomolo oni organizis mitingon lige kun la nova Stokholma Apelo pri kolektado de pacsubskriboj. Dum libertagoj estis aranĝataj interesaj ekskursoj. La brigadanoj vizitis la tracan tombejon kaj fortikaĵon en v. Mezek, la distriktan muzeon, la muzeon de dommetioj, la etnografian muzeon en Ĥaskovo kaj la for-

likajon Mineralbanejoj de Ĥaskovo, la muzeojn de la nialanda socialisma konstruado kaj de la poeto Penju Penev en Dimitrovgrad. En la lasta urbo ili prezentis florkronon antaŭ la bustomonumenton de Zamenhof. La avangarduloj de la brigado partoprenis en la solenaĵoj okaze de 30-jariĝo de la brigadana movado en Bulgario apud baraĵlago „Georgi Dimitrov“.

Post la brigado estis organizita ekskurso tra la lando kaj ripozo ĉe la Nigra Maro en nia ĉarma Varna. Kun granda intereso la brigadanoj rigardis la Monumenton de Libereco sur

montopinto Stoleto en Balkan-montaro, la etnografian kaj arkitekturan komplekson „Etâra“ apud Gabrovo, la vidindaĵojn de la unika urbo Veliko Târnovo, la botanikan ĝardenon en Balĉik, la ripozkompleksojn „Albena“, „Oraj Sabloj“ kaj „Amikeco“.

Apud la bordo de rivero Marica la brigadanoj pasigis agrablajn tagojn, kaj Esperanto gajnis novajn amikojn. Sed plej multe gajnis la paco, la amikeco kaj la solidareco inter la popoloj.

Todor Dimitrov

LA SESA FIER

La ĉi-jara Sesa Foira Internacia Esperanto-Renkontiĝo, okazinta en Plovdiv (8—10 de septembro), estis dediĉita al la 100-jariĝo de la Aprila Ribelo de nia popolo kontraŭ la osmana jugo. Ĝin partoprenis 130 esperantistoj, inter kiuj prof. Sergej Krajnov kaj la verkistino Nadia Andrianova el Sovetunio, Lasto Fjoldvari (Hungario), kvar esperantistoj el Pollando ka.

La interkona vespero estis en restoracio „Kiŝinev“. Salutparoladojn faris prof. Krajnov — en la nomo de la sovetaĵ esperantistoj, kaj Irena Sajovska — el Pollando. En la nomo de la sofiaj esperantistoj salutis Violin Oljanov. Estis prezentita kultura programo.

La 9-an okazis ekskurso al la famaj april-lokoj Panagjuriŝte kaj Oboriŝte, kiun partoprenis 83 personoj. Antaŭ la monumento en Oboriŝte oni prezentis florojn kaj per unuminita silento honoris la memoron de la pereintoj en la Aprila Ribelo. Veselina Kurteva parolis pri la heroaĵo de aprilanoj. Prof. Krajnov rakontis pri la eĥo, kiun la Ribelo havis en Rusio, kaj pri la helpo de la rusa popolo por liberigo de Bulgario. Profunde emociis la publikon la poemo „Koĉo“ de Ivan Vazov, recitata de Kurteva.

En Panagjuriŝte la ekskursantoj vizitis la domon-muzeon de Rajna la Princino.

La 9-an vespere en Plovdiv estis aranĝita amuzvespero.

La 10-an oni trarigardis la 32-an Internacian Foiron de Plovdiv.

M. D.

En la teksta teknikumo en Vraca

La lernejana E-societo „Anne Frank“ en la Teksa Teknikumo en u. Vraca raportas kun fiero, ke ĝi komencis la novan lernojaron per 2 elementaj kursoj po 36 lernantoj, 3 progresintaj kursoj po 34 lernantoj.

La fakultativaj studhoroj okazas regule en la semajna programo sub gvido de la E-instruisto Enjo Daskalov.

Komencis sian laboron ankaŭ la 25-membra esperantista foto- kaj kinoklubo, gvidata de E. Daskalov.

S. Kojnarski

Kamarada helpo al esperantisto

Laŭ uniciaĵo de la prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Ruse Stojĉo Cankov deko da esperantistoj laboris helpe al s-ano Stojan Vojĉev ĉe la konstruado de lia domo, kiam oni faris la betonplaton. La laboro estis streĉa, fortoraba, sed tre valora. La koro de la novdoma posedanto pleniĝis je ĝojo pro la kamarada helpo. Tiu nobla faro forte impresis al la najbaroj kaj aliaj flankaj personoj.

Stojan Vojĉev estas aktivulo de la urba E-societo „Libero“. Pasintjare li kolektis 192 abonojn al „Bulgara Esperantisto“ kaj 35 al „Paco“. Siatempe la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ aperigis lian nomon kaj foton sur la honora Verda Tabulo.

Nedko Georgiev

KONKURSO „KION VI SCIAS PRI URBO PLOVDIV KAJ ĜIA EVOLUO“

E-societo „Kulturo“ — Plovdiv, anoncas jenajn rezultojn de la konkurso okaze de 75-a datreveno de la E-movado en tiu ĉi urbo:

UNUA PREMIO A: senpagan partoprenon en la Internaciaj E-kursoj en Burgas gajnis Roza Halas el Hungario.

UNUA PREMIO B: senpagan partoprenon en la seminario kaj feriado en Velingrad gajnis Mirdza Burgmeister el Riga (Latvia SSR).

DUA PREMIO: senpagan 5-tagan restadon en Plovdiv dum la Internacia Foiro gajnis Tereza Dyl kaj Wiesława Krzeczowska el Pollando.

TRIA PREMIO: senpagan partoprenon en la Foira Internacia Esperantista Renkontiĝo en Plovdiv gajnis P. Berkhout el Nederlando.

OBJEKTAN PREMION ricevas Jiřt Ptrlík el Ĉeĥoslovakio.

Ĉiuj aliaj partoprenintoj ricevas memoraĵojn.

EN LA INSTRUBAZO APUD DRUJEVO

La Bulgara Esperantista Kooperativo (BEK) helpas la E-movadon en nia lando per havigo de E-literaturo, gramofondiskoj kaj aliaj esperantaĵoj, kiujn ĝi proponas en siaj 14 librovendejoj en Sofio.

Paralele kun tio la Kooperativo zorgas ankaŭ pri la disvastigo de Esperanto. En pitoreska regiono apud v. Drujevo en la Balkanmontaro ĝi kreis instrubazon por 20 personoj. La loko estas bela, trankvila, la aero pura. Ĉi tie oni bonege povas kaj lerni, kaj ripozi.

En aŭgusto en la tendaro de BEK funkciis E-kurso de Esperanto, kiun partoprenis junaj homoj, precipe gelernantoj el Preslav, Simitli, Pleven, Sofio kaj v. Drujevo. La instruadon gvidis d-ro Stojan Moraresku el Sofio. La laboro pasis je alta nivelo kaj la rezultoj estis tre bonaj.

Bedaŭrinde, ĝis nun oni minimume uzas la instrubazon apud Drujevo. Somere tie povas funkcii kelkaj sinsekvaj lernogrupejoj. An-

kaŭ ripozo por esperantistoj povas esti organizata. Necesas, ke la estraro de BEK kaj la Sofia Distrikta Estraro de BEA, kiuj kune prizorgas la laboron en la bazo, dividu pli grandan atenton al ĝi. Oni devas plene utiligi tiun ĉi realan eblecon por disvastigo de nia lingvo.

Cvetana Uzunova

Ĉeĥoslovakaj esperantistoj en Tolbuĥin

Komence de septembro en nia urbo Tolbuĥin gastis unu tagon ĉeĥoslovaka esperantista grupo kun gvidanto Jozef Vitek — prezidanto de Ĉeĥa E-Asocio.

Okazis ĝoja renkontiĝo inter la gastoj kaj la lokaj esperantistoj. La prezidanto de la urba E-societo Ivan Ganĉev konigis al la gastoj la revolucion pasintecon kaj la novan vivon de Dobruĝa. La grupo vizitis la distriktan historian muzeon kaj la etnografian domon.

La gastoj forveturis al la Nigra Maro por ripozi en „Albena“.

TRA LA E★ MONDO

LA SEPA MEM-KONFERENCO EN RUSE

Tuj post la 39-a kongreso de BEA okazis en Ruse la Sepa Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Oni pritraktis la trijaran agadperiodon post la Sesa Konferenco, okazinta en Beogrado en 1973. Raporton faris la ĝenerala sekretario inĝ. Drahomir Kočvara. Pri la oficiala organo de MEM — la revuo «Paco», estis aparta raporto de la ĉefredaktoro William Gilbert. La centra administranto Boris Popov faris konstatojn kaj rekomendojn rilate la administran kaj financon de MEM.

Okazis viglaj debatoj, en kiuj oratoroj el diversaj landaj sekcioj de MEM esprimis sian rilaton al la tuŝitaj en la raportoj problemoj kaj taskoj. Ĉiuj estis uruanimaj, ke antaŭstaras periodo de pli intensa agado de MEM en la etoso de la reliefiginta malpliigo de la internacia streĉeco kaj la perspektivoj de kunlaborado kaj sekureco inter la ŝtatoj precipe post la historia Tuteŭropa Konferenco, okazinta en Helsinko 1975. MEM devas plibonigi ĉiurilate sian agadon arkaŭ pro tio, ke la reakciaj rondoj de la imperiismo kaj ties dekstraj kaj «maldekstraj» aliancanoj, serioze maltrankviligi aj de la sukcesoj de l'Helsinkia Konferenco, entreprenas furiozajn atakojn

kontraŭ la fortoj, batalantaj por paco, sekureco kaj kunlaborado sur la principoj de aktiva paca kunekzistado.

La registritaj sukcesoj de la ĝisnuna MEM-agado kaj la akirita prestiĝo de nia movado inter la monda esperantistaro morale devigas la estraron de MEM fari ĉion eblan por ankoraŭ pli aktiva kaj fruktodona laboro de ĉiuj MEM-anoj. Ni esperas, ke la novelektita estraro ĝojigos la pacamikojn en ĉiuj landoj per efektivigo de la taskoj, formulitaj en la aprobita de la Konferenco rezolucio.

Je la nomo de la ĉeestintoj la Konferenco voĉdonis salutleterojn al la Monda Packonsilantaro, al la Bulgara Packomitato kaj al la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

En la telegramo al la Bulgara Packomitato interalie oni legas: «La delegitoj de la landaj MEM-sekcioj faris bilancon de la agado dum la pasinta trijara periodo, intime ligitan kun la realigo de la decidoj de l' Monda Kongreso de Pacamaj Fortoj (Moskvo, 1973). Surbaze de la subskribita en Moskvo dokumento por komuna agado de MPK kaj MEM, nia movado ankoraŭ pli energie luktos por realigo de la principoj de la Fina Akto, aprobita en Helsinko. Lige kun tio la Konferenco apelaciis al ĉiuj esperantistoj partopreni aktive la subskribkampanjon de la nova Stokholma Alvoko. La partoprenintoj en la Konferenco esprimas sian profundan dankon al la Bulgara Packomitato pri la grandanima subteno flanke de la organoj de la bulgara pacmovado, kiun ili donis al ni por la sukcesa okazigo de la Konferenco».

La vesperon post la finiĝo de la aferdiskutoj estis organizita publika neesperantista kunveno. Prezidis Cvjatko Cvetkov — prezidanto de la Distrikta Packomitato, reprezentanto de la Bulgara



ESPERANTO-ARANĜO EN RIGA

Forpasis jam la somero, ĉi-jare tre riĉenhava kaj impresoplera por la latvaj esperantistoj. Dank' al persista laboro de Talis Bercis kaj Aristids Medinš tre aktiviĝis la junularo. Junaj homoj partoprenis piedmarŝon tra duon-insulo Kola, ve'uris al la Sovetia Esperanta Junulara Tendaro (SEJT) apud urbo Tihvin, en Lenigrado renkontiĝis kun eksterlandaj esperantistoj; tri gejuruloj (el Riga kaj Liepaja) partoprenis la 39-an kongreson de la bulgaraj esperantistoj en Ruse. Niajn junajn gesamidea-rojn oni povas ofte vidi en diversaj lokoj de nia respubliko, kie ili, marŝante laŭ turismaj vojoj, aktive propagandas Esperanton.

Fine de septembro la anoj de la junulara E-klubo en Riga organizis vesperon kune kun la membroj de la E-klubo de Riga kaj raportis pri sia somera agado. S-ano Aldis Buŝs rakontis pri la bulgara E-kongreso en Ruse, kiu estas ĝemela urbo de Riga, kaj kun s-ino Lucija Zemberga prezentis kolorajn diapozitivajn pri Bulgario. Antaŭ la okuloj de la ĉeestantoj ŝanĝiĝis belegaj pejzaĝoj kaj viĉaĵoj de Sofio, Plovdiv, Gabrovo, la nigramara ripozloko Alpera.

Aristids Medinš prezentis fotojn, interese rakontante pri la turismaj vojoj en duoninsulo Kola kaj la serioza laboro de SEJT apud Tihvin. Ses junaj riganoj tie faris bone E-ekzamenon. Ili solene estis akceptitaj kiel plerrajtaj anoj de la junulara E-klubo. Antaŭ la akcepto ili devis plenumi kelkajn taskojn kaj solene ĵuri iam gardi la honoron de sia klubo, aktive labori por disvastigo de Esperanto kaj la politika viĉpunkto de nia multtracia lando.

Poste la junaj homoj prezentis kantojn, komponitajn de junuloj mem.

La vesperon pliriĉigis E-tema viktorigo, tea-tablo, gajaj ludoj, ekspozicio de E-revuoj kaj muziko.

Saulcerite Neilande

Packomitato kaj ĉefredaktoro de la distrikta ĉiutaga ĵurnalo. Parolis doc. Kameŝkov (USSR), Schödl (GDR), Staszczak (Pollando). La publiko varme aplaudis ilin.

La Sepa Konferenco de MEM elektis novajn gvidorganojn. Por la kvina fojo estis reelektita kiel prezidanto Nikola Aleksiev (Bulgario). Kiel vicprezidantojn oni elektis du novajn personojn: d-ron Magomet Isaev (Sovetunio) kaj d-ron Renato Corsetti (Italio). Ĝenerala sekretario estiĝis William Gilbert (Francio), sekretarioj — Hideo Kumaki (Japanio) kaj ing. Drahomir Kočvara (Ĉeĥoslovakio). Ĉefredaktoro de revuo «Paco» estos la profesia ĵurnalisto Violin Oljarov (Bulgario) kaj centra administrantino Vasja Petrova (Bulgario). Kasisto por nesocialismaj landoj — Pierre Jauvin (Francio).

Konferencano

LA GREKA POSTKONGRESO

La varmegaj, streĉaj kongrestagoj en Ateno jam estis for. Nia kara verda flago komencis sian longan vojon de la plej varma, suda parto de nia kontinento — la bela Greklando — al la plej norda, Islando.

La partoprenintoj de la kongreso ankaŭ forlasis la blankan Atenon. Sed grupo de ĉirkaŭ cent kongresanoj restis. Lunde, la 9-an de aŭgusto, ĝuste je la 11 horo el la haveno de Pireo ili komencis neordinaran postkongreson: krozaĉon per la luksa ŝipo «Iliria» tra la ĉarma greka insularo. Mi estis ege feliĉa ankaŭ partopreni la krozaĉon.

Post la enŝipiĝo, dum koktelo la ŝipestro bonvenigis la pasaĝerojn kaj prezentis al ni la tutan ŝipanaron. Tiam venis la unua malgaja anonco, la unua kaj la lasta: pro nekonvena maro ni ne povis ankriĝi apud insulo Delos!

Posttagmeze, je la 18,30, ni haltis ĉe la bordo de Mikonos. Boatoj kaj busoj transportis nin en fabele blankan urbeton kun la sama nomo. Domoj, preĝejoj (360!), ventomuelejoj, stratoj, ŝtuparoj — ĉio brilas de blankeco. Eĉ la malhelblua maro estas blanka ĉe la bordo pro la domoj. Ni promenis tra labirinto de mallarĝaj stratoj, blankaj muroj kaj lignaj balkonoj, pitoreske ornamitaj per buntaj florpotoj. Oni ravite forlasis tiun ĉi mirinde belan perlon de la Egea Maro.

Pasis la unua amika vespero sur la ŝipo. Frumatene preskaŭ ĉiuj pasaĝeroj estis sur la ferdeko. Miaj okuloj avida a'endis la silueton de Rodos — la plej granda, la plej alloga ĉdekaneza insulo.

Kaj jen ni atingis ĝin. Ambaŭflanke de la haveno vidiĝas koloj kun cervoj — la simbolo de Rodos. Nevole, kun fermitaj okuloj

*Nina Pirofnaia
deĵoras kiel
interpretistino
en hotelo
„Ĵemĉujina“ —
Soĉi (USSR)*



mi prezentis al mi la faman Rodosan Koloson, delonge malaperintan sen spuroj sub la batoj de la jarcentoj.

Sube atendis nin aŭtobusoj, kaj ni devis rapidi. Tuja forveturo al la antikva Lindos — unu el la tri plej malnovaj urboj de la insulo. Post 55 km preter agrabla natura dekoro, kie viciĝis unu post alia belaj, harmonie modelitaj pejzaĝoj kaj pitoreskaj vilaĝoj, ni atingis Lindos. Antaŭ ni majeste altis la akropolo de la antikva urbo, iama centro de la kulto de Ateno. En ĝiaj piedoj blankis domoj. Ni malrapide grimpis la rokan krutan altaĵon, sur kiu en la 15-a jc. kavaliroj konstruis potencon fortikaĵon.

Kia vidaĵo! Longa kolonara enirejo kondukas laŭ monumenteca ŝtuparo al la templo de Ateno. Sur la fono de la malhelblua maro siluetas la imponaj, en doria stilo kolonoj de unu el la plej belaj antikvaj temploj en Greklando. Malsupre — belegaj golfetoj ĉirkaŭitaj de pitoreskaj rokoj. Kvazaŭ ĉiutage momente el la profunda diafana akvo aperus la diino de la beleco. Neordinara, neforgebla travivaĵo!

Tamen . . . denove sur la vojon! Posttagmeze ni transigardis la urbon Rodos. Ambaŭ urboj — la nova kaj la malnova — bonege harmonias kaj sugestas la iaman majestecon kaj famon de Rodos. Pompa vegetaĵaro, ekzotikaj floroj kaj palmoj ĉirkaŭas la mezepokajn kolonarojn kaj arkadojn, domojn, placojn. Majeste aspektas la mezepoka kastelo de la kavaliroj, restaŭrita. Sed la muzeo estis fermita kaj la belegan Venuson de Rodos, bedaŭrinde, ni ne povis vidi.

Venis la tria tago. Al Kreto! Al la fajrujo de la plej malnova civilizo en Eŭropo!

Tri horojn da navigado. Mirinde, ĉu ne? De la haveno de Heraklion ni tuj forveturis al Knosos. Rapide estis atingita nia celo — la fama palaco de la legenda reĝo Minos. Sur malalta monteto — ruinoj kaj rekonstruitaj diversaj aloj, ŝtuparoj, kolonoj, malfermitaj galerioj kaj portikoj. Mi haltis apud nealta pilastruro, rigardante kopion de la kolora reliefa fresko de la legenda taŭro. Rapide ni trapasis vicon da ĉambroj: de la reĝo, de la reĝino, festhalo, la fama solena tronhalo. Forte impresas la murpentraĵoj. En la kortoj grandegaj argilaj amforoj sugestas pri la ekonomia vivo kaj komerco en la antikva Kreto.

Malpli ol unu horon ni disponigis al la ege riĉa, unika en la mondo muzeo de Heraklion. Kvar mil jarojn la kreta tero kaŝis nemezureblan riĉaĵon, trovitan nur antaŭ unu jarcento. Kaj ni kun rapideco de filmbendo devis rigardi tiun ĉi trezorejon!

La minoa ceramikaĵo kun sia modela tekniko, fajnaj dinamikaĵoj, glazuroj kaj koloroj, sigeloj el diversaj gemoj, belegaj verkoj de la malgranda skulptarto kun la fama fajenca statueto «serpentdiino», ritonoj kun

riĉaj reliefoj, oraj juveloj, ponardoj kajnifine fragmentoj de la konservitaj murpentraĵoj el la palaco de Knosos.

Ne tute trankvile mi rigardis la faman, belegan «Parizaninon», la «Lili-princon», malsimplajn fragmentojn de kultaj scenoj ka. Ne mankis bestobildoj, precipe la legenda taŭro, vegetaĵoj. Ĉio ĉi montras ne nur altnivelan arton, sed same prezentas la iaman ĉiutagan vivon de la antikva insulo.

Kun ega bedaŭro pro la receso rapidi ni forlasis tiun ĉi trezorejon de la homa kulturo. Denove al la haveno! En la foro malrapide dronas la akrapinta monto Ida. Ni adiaŭas Kreton.

Post kvar horoj ni ankriĝis apud Santurini — la dua perlo de kikladoj, ĉarma, stranga insulo, iama vulkano. Nun supre, sur la malhela lafo, ĉe la rando de la kratero, kiel blankaj birdoj sidas la domoj de Tira.

Ni apenaŭ tuŝis la teron per piedoj — kaj antaŭ ni subite aperis aro da muloj. Rapide ni trovis nin sur la bestoj. Rajdante ni zigzagis laŭ la sennombraj, larĝaj ŝtuparoj al la pinto. Ne estus agrable piediri sufiĉe alten (200 m). Supre — mirinda vidaĵo! En la blua maro harmonie konturiĝas malgrandaj, etaĵinsuloj. Ĝuste kontraŭ la tre bela insuleto estas vulkano, kiu de tempo al tempo erupcias. Ĉirkaŭ ni ĉio brilas de blankeco. Denove lkonataj jam blankaj domoj. Denove ni vagas tra mallarĝaj stratetoj, kie svarmas multnombraj turistoj. Ori vidas ilin en ĉiuj anguloj kaj butikoj, bunte, iuj strarge vestitaj donantaj apartan kolorecon al la brile blank, Santurini.

La suno forlasis tiun ĉi fabelan mondon. Ankaŭ nia ŝipo. Sur la ferdeko, en la vespera krepusko ni lorge observas la fantazian kolieron de la insuloj. La sorĉa sonĝo jam finiĝis. Morgaŭ frumatene ni estos en Pireo.

Katja Maneva

LA 44-A KONGRESO DE LIBE

En la ripozloko Stuberberg (Štubenberĝ), Aŭstrio, de la 24-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto ĉ. j. okazis la 44-a kongreso de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). En ĝi partoprenis 97 reprezentantoj el 16 landoj, inter kiuj 7 el Bulgario.

La ĉefaj demandoj, kiujn pritrakitis la kongreso, estis la agado de LIBE kaj la afero de la blinduloj. Por la kongresanoj estis organizitaj amuzvesperoj, ekskursoj, E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj. La urbestro de Graz donis specialan akcepton al la kongresanoj en la salonoj de la urbodomo. La malfermon de la kongreso ĉeestis reprezentantoj de oficialaj instancoj de Ŝtirio kaj de la Aŭstria E-Federacio. Radio Graz elsendis 15-minutan raportojn pri la kongreso.



Mesaĝoj de amikoj

Karaj amikoj el la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ !

En julio ĉi-jare mi vizitis vian landon kie gasto de E-societo «Kolombo de la Paco» en urbo Gâlâbovo, distrikto de Stara Zagora. Per via gazeto mi deziras esprimi mian elkoran dankon al la bulgara esperantistaro kaj al la tuta gastama bulgara popolo.

La invito estis farita de k-ĉo Kanjo Kanev — prezidanto de societo «Kolombo de la Paco» en Gâlâbovo. Kun li mi konatiĝis en Budapeŝto dum la Vintra E-Semajno 1975. La tuta mia restado en Bulgario estis aranĝita de li.

Mi partoprenis kun Kanjo la kongreson de BEA en Ruse kaj poste ni kune vizitis multajn loĝlokojn kiel Gâlâbovo, Stara Zagora, Plovdiv, Târnovo, Burgas, Smoljan, Kazanlâk, Ŝipka ka. Fine mi pasigis du semajnojn en la Internacia E-Lernejo en Pisanica. Mia animo estas plenplena de belaj rememoroj, impresoj kaj travivaĵoj en la mirinde bela bulgara lando kaj inter ĝia gastama, bonhumora kaj laborema popolo.

Bulgario estas lando riĉa je naturaj belaĵoj. Apud la interesaj historiaj rimarkindaĵoj en ĉiuj anguloj de la lando oni vidas novajn industriajn kaj sociajn konstruaĵojn. Tio klare montras, ke la bulgara popolo senĉese kaj diligente laboras kaj certe marŝas sur la vojo de socialismo kaj komunismo.

En ĉi tiu vigla laborado partoprenas ankaŭ la bulgara esperantistaro. Mi elkore dankas al ĝi, aparte al la membroj de E-societo «Kolombo de la Paco» en Gâlâbovo kaj al ties prezidanto k-ĉo Karev, ankaŭ al k-ĉo Rajno Ĉipilev — prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en u. Stara Zagora. Ĉiuj ili helpis min konatiĝi kun la gastama bulgara popolo.

Dankon ankaŭ al k-ĉoj Nikolaj Bojaĝiev el Plovdiv kaj Georgi Dimov el Varna, kiuj entuziasme instruis al ni Esperanton en Pisanica.

*Sincera via Demeter Kalman
u. Sfântu Gheorghe, Rumanio*

Por unua fojo, ĉi-jare la kongreso de LIBE estis oficiale salutita je la nomo de CE de BEA, kaj la salutoj estis varme akceptitaj. La bulgaraj reprezentantoj aktive partoprenis en preskaŭ ĉiuj kongresaj aranĝoj. Antaŭ la kongreso oni tralegis la tradukitan laŭ iniciato de DE de BEA kaj la societo de blindaj esperantistoj «Lumo» en Plovdiv artikolon «Parko-gardeno por blinduloj» el revuo «Sano» (n-ro 4/1976). La traduko estis akompanita de mallonga klarigroto pri la revuo kaj pri la motivo por publikigo de tiu ĉi artikolo. En la kongresaj diskutoj partoprenis Tanja Mileva kaj Vladimir Jelev. Stefan Paŝkulov kaj Sultanka Mineva per siaj kantistaj talentoj gajnis

*Nadia Andrianova**

ĜIS REVIDO, BULGARIO !

Frata tero Bulgario,
land' floranta kaj belega !
Revis mi dum longaj jaroj
ree veni al ĉi land'.

Plenumiĝis revo mia :
mi alvenis al Sofio
kaj parteton de la koro
lasos tie mi de nun.

Ventoj de jarcentoj multaj
sangoplenaj kaj kruelaj,
blovis, bruis sur ĉi tero —
kaj suferis la popol'.

Historio multdolora
de l'bulgara fraptopolo. . .
En memoro reviviĝas
nia propra pasintec'.

Sed popoloj nevenkeblaj,
liberamaj kaj kuraĝaj
la tiranojn superfortis,
liberiĝis el sufer'.

Stara Planina fiera,
Roza Valo, Kalofero,
Oboriŝte kaj Rodopi —
ĉu forgesus ilin mi ?

Ne, ĉi teran paradizon,
homojn grandanimajn, mildajn
tenos mi ĝis lasta horo
en animo por memor'.

La antikva kaj tre juna,
ĉarme bela Bulgario
marŝas al estonto hela, —
ĝin admiras tuta mond'.

Ĝis revido, Bulgario !
Mi revenos al vi nepre.
Ĉu en Ruse, ĉu en Varna
la renkont' atendas nin. . .

** Soveta verkistino kaj aktiva esperantistino
el Kiev, kiu gastis ĉe ni en septembro ĉi-jare.*

la admiron de la ĉeestantoj dum la muzik-programoj en la Instituto por Blinduloj en Graz kaj en la ripozdomo de la Societo de Malfrue Blindiĝintoj en Aŭstrio.

Tamen oni devas diri, ke la partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la kongresoj de LIBE ankoraŭ ne estas bone organizita kaj celdirekta. Iliaj sinprezentoj estas kutime frukto de personaj iniciatoj, kio ne donas al ni eblecon uzi la Internacian Lingvon por pli vasta propagando de la sukcesoj de nia lando en la konstruado de socialismo. En tiu rilato BEA kaj la Asocio de la Blinduloj devas preni necesajn zorgojn.

Vladimir Jelev

Interŭjuo kun soveta lingvisto pri Esperanto

„Sovetskij Sojuz“ („Sovetunio“) estas monata soci-politika revuo, fondita de Maksim Gorkij en 1930 j. Ĝi aperas en rusa, angla, araba, bengala, hungara, vjetnama, hispana itala, ĉina, korea, mongola, germana, rumana, serbokroata, urdu, finna, franca, hindi kaj japana lingvoj. La revuo estas grandformata, 60-paĝa, kolore ilustrita, kun riĉa, varia kaj tre interesa enhavo.

En sia n-ro 8 (aŭgusto 1976) „Sovetskij Sojuz“ en la rubriko „Ni respondas al legantoj“ aperigis interŭjuon kun Magomet Isaev — doktoro de filologiaj sciencoj, prezidanto de la Esperanto-Komisiono ĉe la Asocio de Sovetaj Societoj por Amikeco kun Eksterlando,

Ĉi-sube ni donas la tutan interŭjuon.

LA LINGVA BARIERO. KIEL VENKI ĜIN?

La redakcio ricevas leterojn, en kiuj la legantoj plendas pri la malfacilaĵoj, kaŭzataj de la lingvaj barieroj. Pri tio ekzemple skribas la pentristo Zoltan Vali el Hungario, la francino Marcelle Robineau, Emilia Lapenna el Jugoslavio, Teodor Mândruciul el Rumanio, la nederlanda leganto Anĝelo Agosti, la gvidantoj de la Franca Esperanto-Societo kaj multaj aliaj. Ili demandas, ĉu en nia lando oni uzas la lingvon Esperanto, ĉu aperas libroj kaj gazetoj en tiu lingvo.

Nia korespondanto A. Harkovskij intervjuis pri tiu demando la doktoron de filologiaj sciencoj MAGOMET ISAEV.

Nia unua demando, Magomet Izmajloviĉ, estas pri la malfacilaĵoj — ĉu vere ili estas tiom grandaj, kiel pri tio skribas legantoj?

Sur la tero ekzistas kelkiloj da lingvoj, kaj ĉiam pli da lingvoj ekhavas sian literaturon. Sur la scienciston en ĉiu fako de la scioj surfalas lavango da informoj — centoj da ĵurnaloj, milionoj da patentoj kaj libroj — kaj ĉio ĉi en lingvoj multnombraj, nealireblaj por unu homo. Tiun torenton ne povas venki eĉ la tradukservo. Aldonu al tio la astronomiajn sumojn, kiujn ĉe la ekzistanta situacio oni estas devigataj elspezi por tradukado ĉe miloj da internaciaj renkontiĝoj, kaj vi konsentos, ke la komuna helpa lingvo por solvo de tiu ĉi problemo estus grandega bono.

Sed ĉu tiun ĉi rolon ne ludas la lingvoj de la grandaj nacioj?

Estas diferenco inter „ludi rolon“ kaj „esti“. Historiajn funkciojn de internacia rimedo por komunikado havis diversaj lingvoj — greka, latina, araba, franca, angla. Sed ĉiuj ĉi lingvoj de kulturaj nacioj posedas egalajn esprimkapablojn kaj tial ili devas havi egalajn rajtojn. Se unu — kiu ajn — lingvo manifestas pretendojn esti internacia, tio igas la aliajn popolojn protesti, ja hegemonio de lingvo, tio estas hegemonio de kulturo. Ni, marksistoj, koncerne tiun demandon staras sur la klara, nedusenca pozicio de V. I. Lenin: „Eĉ ne unu privilegio por kiu ajn nacio, por kiu ajn lingvo.“ Kaj se iu internacia organizo aŭ kongreso elektas unu el la lingvoj kiel laboran, tio okazas nur pro akra bezono. Definitive oni povas solvi la problemon nur pere de helpa internacia lingvo.

Riceviĝas tiel: la lingvistoj konas rimedon por venki la «babelturon» el centoj da lingvoj, sed samtempe la socio malmulton scias pri tio.

La organizita, plana lingvo havas multjar-

centan historion. Super tiu ideo laboris Descartes (Dekart) kaj Leibnitz (Lajbnic), Volter, Montesquieu (Montesĵo), Jan Komenski. Oni proponis kelkcentojn da projektoj de artefaritaj lingvoj. Kaj apenaŭ en la unua kvarono de la XX-a jarcento unu el ili venkis — Esperanto, kies fundamentoj estis donitaj en 1887-a de la pola humanisto d-ro L. Zamenhof. Tiu ĉi elstara pensulo selektis internaciajn radikojn — precipe el la latina, sed trapasintajn la kontrolon de aliaj lingvoj, — kunigis ilin per klara, preciza kaj simpla gramatiko, ne havanta esceptojn, kaj donis al la lingvo la melodiecon de la hispana kaj itala lingvoj. Tradukistoj ĉe la internaciaj renkontiĝoj de la esperantistoj ne necesas — tie ili simple ne estas bezonataj. Ĝustaloke: ellerni Esperanton oni povas nur dum kelkaj monatoj.

En tiu lingvo ekzistas granda originala kaj tradukita literaturo — dekmiloj da libroj. Ĉi tie estas verkoj de Dante, Shakespeare (Ŝekspir), Puŝkin, Leo Tolstoj. . . Mi citos aŭtorojn eldonitajn en Esperanto ĉe ni: Ŝoloĥov, Majakovskij, Gajdar, Esenin, Rajnis, Lesja Ukrainka, Lavrenĵov, Garsia Lorka. . .

En Esperanto aperas ĉirkaŭ cent ĵurnaloj kaj gazetoj, inter kiuj la soveta „Paco“ kaj „Por la Paco“. En ĝi konstante elsendas 18 radiostacioj — Varsovio ekzemple trifoje en la tagnokto.

Kial multaj homoj opinias Esperanton bona ideo, sed ve — ne akceptita de la vivo?

Planlingvo, t. e. tia, kies fundamentoj estas donitaj de sciencisto, povas ricevi civitanan rajton nur en la vivanta praktiko, firmiĝinte en la literaturo kaj la scienco. La historio konas nemalmultajn lingvistikajn homunkulojn: ido, okcidenta, interlingva, kiuj tute ne eliris el la laboratorioj, restinte ludilo en la manoj de amatoroj. Alia estas la sorto de Esperanto. Jam



Интервю със съветски езиковед за Есперанто

„Советский Союз“ е месечно обществено-политическо списание, основано от Максим Горки през 1930 г. То излиза на руски, английски, арабски, бенгалски, унгарски, вьетнамски, испански, италиански, китайски, корейски, монголски, немски, румънски, сърбо-хърватски, урду, фински, френски, индийски и японски език. Списанието е голям формат, 60 страници всеки брой, с цветни илюстрации и богато, разнообразно и много интересно съдържание.

В бр. 8 от август 1976 г. „Советский Союз“ в рубриката „Отговаряме на читателите“ помести интервю с МАГОМЕТ ИСАЕВ — доктор на филологическите науки и председател на Есперантската комисия при Съюза на съветските дружества за приятелство с чужбина. По-долу поместяме цялото интервю.

ЕЗИКОВАТА БАРИЕРА. КАК ДА БЪДЕ ПРЕОДОЛЯНА?

Редакцията получава писма, в които читателите се оплакват от трудностите, причинявани от езиковите бариери. За това например пише художникът Золтан Вали от Унгария, францужойката Марсел Рубино, Емилия Лапена от Югославия, Теодор Мъндруциу от Румъния, холандският читател Анжело Аго-ти, ръководителите на Френското есперантско дружество и много други. Те питат дали в нашата страна се използва езикът есперанто, излизат ли на този език списания и книги.

Нашият кореспондент А. Харковски интервюира по този въпрос д-ра на филологическите науки МАГОМЕТ ИСАЕВ.

Нашият първи въпрос, Магомет Измаилович, се отнася до езиковите трудности — те наистина ли са толкова големи, както пишат читателите?

На земята съществуват няколко хиляди езика, при това все повече езици придобиват писменост. Върху учения от която и да било област на знанията все повече се струпва лавина от информация — стотици списания, милиони патенти и книги и всичко това на многобройни, недостъпни за един човек езици. С този поток няма сили да се справи и преводаческата служба. Прибавете към това астрономическите суми, които при съществуващото положение наложително се изразходват, за да се уреди превеждането при хилядите международни срещи, и вие ще се съгласите, че за решаването на този проблем общият спомагателен език би бил велико благо.

Но нима тази роля не играят езиците на великите нации?

Има разлика между „играя роля“ и „съм“. Исторически функции като международно средство за общуване са изпълнявали разни езици — гръцки, латински, арабски, френски, английски. Но всички тези езици на културни нации притежават еднакви изразни способности, затова трябва да се ползват от еднакви права. Щом един език, който и да е той, изявява претенции за международен, това предизвиква протест у другите народи, защото господството на езика е господство на културата. По този въпрос ние, марксистите, изхождаме от ясното и недвусмислено становище на В. И. Ленин: „Никаква привилегия за нито една нация, за нито един език.“ И ако някоя международна организация избира един от езиците като работен, това става само поради остра необходимост. Проблемът може окончателно да бъде решен

само с помощта на спомагателен международен език.

Получава се така: езиковедите знаят средство за преодоляване на „вавилонското стълпотворение“ от стотици езици, а в същото време обществеността малко знае за него.

Организираният, плановият език има многовековна история. Над тази идея са работили Декарт и Лайбниц, Волтер, Монтескьо, Ян Коменски. Предлагани са няколкостотин проекта на изкуствени езици. И едва в първата четвърт на XX век победи един от тях — есперанто, чиито основи са дадени през 1887 г. от полския хуманист д-р Л. Заменхоф. Този бележит мислител подбрал международни корени — преди всичко от латински, но минали през проверката на други езици, — обединил ги чрез ясна, точна и проста граматика без изключения и придал на езика музикалността на испанския и италианския. Преводачи на международните срещи на есперантистите няма — там те просто не са необходими. Тук му е мястото да кажем, че есперанто може да се изучи само за няколко месеца.

На този език съществува голяма оригинална и преводна литература — десетки хиляди книги. Тук има произведения на Данте, Шекспир, Пушкин, Лев Толстой . . . Ще назова автори, издадени на есперанто в нашата страна: Шолохов, Маяковски, Гайдар, Есенин, Райнис, Леся Украинка, Лавренъов, Гарсия Лорка. . .

На есперанто излизат около 100 вестника и списания, между които съветските „Пацо“ („Мир“) и „Пор ла пацо“ („В името на мира“). На него постоянно предават 18 радиостанции в света — Варшава например 3 пъти на денонощие.

А защо мнозина смятат есперанто за

en 1905 okazis la unua kongreso de la adeptoj de tiu internacia lingvo, ekde tiam okazis 60 tiaj kongresoj (nur la internaciaj, kaj la naciaj estas multe pli). La homoj komencis paroli en tiu ĉi lingvo kaj tiamaniere inspiris vivon al ĝi — nuntempe en la mondo estas milionoj da esperantistoj. Nur la Universala Esperanto-Asocio, fondita en 1908, nombras en siaj vivoj pli ol 30 000 membrojn el 60 landoj, — kaj tio estas aktivuloj, homoj pretaj helpi al eksterlandaj turistoj en siaj landoj, homoj, kiuj propagandas kaj instruas Esperanton. En 1966 j. 72 milionoj da homoj — persone kaj pere de la reprezentantoj de siaj organizaĵoj, subskribis peticion al UNO kun peto rekomendi la instruadon de tiu lingvo en la lernejoj.

Kaj kiamaniere oni nun lernas tiun ĉi lingvon? Rakontu pri la Esperanto-movado en nia lando.

La lingvon oni lernas precipe en klubaj rondoj aŭ en lernejoj, sed fakultative. En USSR kluboj kaj rondoj de esperantistoj ekzistas preskaŭ en ĉiuj pli grandaj urboj. La tuta internacia agado de niaj esperantistoj estas kunordigata de speciala komisiono ĉe la Asocio de Sovetaj Societoj por Amikeco kun Eksterlando. Nome ĝi eldonas belartan kaj politikan literaturon en Esperanto.

La sovetaj esperantistoj partoprenas la movadon de la pacadeptoj. En 1954 estis fondita nova organizaĵo — MEM (Mondpaca Esperantista Movado). Ĝi havas sekciojn en 30 landoj, inter kiuj la nia, la sovetaj, estas konsiderata kiel unu el la plej aktivaj. En 1967 MEM eniris la tutmondan pacmovadon kaj en 1973 ĝia gvidanto, la bulgaro Nikola Aleksiev, estis elektita kiel membro de la Tutmonda Packonsilio. En 1973 enkadre de la Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo okazis renkontiĝo inter delegitaroj de MEM kaj la Tutmonda Packonsilio frunte kun Romeŝ Ĉandra. Ĝi finiĝis per subskribo de komuna deklaro pri kunlaborado de la du organizaĵoj kun la celo uzi Esperanton por interŝanĝo de spertoj inter la naciaj komitatoj de la pacadeptoj.

Ĝustaloke: kial Esperanto estas nomata helpa lingvo, ĉu ĝi ne pretendas pri la rolo de ĝenerala, universala?

Ne kaj ne. La fama sovetaj lingvisto prof. E. Bokarjov ĉiam substrekis, ke la universala lingvo estas afero de malproksima estonteco, kaj la helpa lingvo estas vivnecesa problemo nun.

Kaj kiel la verkistoj kaj sciencistoj taksas Esperanton?

Tiu ĉi lingvo havis kaj havas multajn adeptojn — inter ili Leo Tolstoj, Maksim Gorkij, Henri Barbusse, Romain Roland, Lu Sinj, Konstantin Ciolkovskij, Ivan Miĉurin, Vladimir Obruĉev ka. Se temas pri la lingvistoj, en la komenco de la XX jarcento kreiĝis branĉo de la scienco, kiu studas la funkciadon de la internacia aŭ plana lingvo — interlingvistiko. Ekzistas internacia Akademio de Esperanto, kies membroj estas la elstaraj sovetaj sciencistoj P. Ariste, G. Sevak, V. Grigorjev.

Nedelonge la Prezidentaro de la Akademio de Sciencoj en USSR komisiis al la Instituto de Lingvoscienco „studi la demandojn pri helpa lingvo por internacia komunikado, la eblojn pri ĝia uzado en la nuntempaj kondiĉoj“. Estis kreita grupo pri la problemoj de la internacia helpa lingvo.

En la kuranta jaro verkoj de sovetaj sciencistoj aperis en la kolekto „Problemoj de la interlingvistiko“. En la artikoloj, publikigitaj en ĝi, la sciencistoj venas al la konkludo: Esperanto estas la nura planlingvo, taŭga por internacia komunikado. Ili substrekas la neceson de pli vasta uzado de Esperanto por venki la lingvajn barierojn.

Kaj kian estontecon vi vidas por la lingvo Esperanto?

Esperanto ne estas celo, sed antaŭ ĉio rimedo por forigo de tiuj malfacilaĵoj, kiujn la multlingveco kaŭzas sur la vojo de la progreso. Se oni ne turnas sin al la helpa lingvo, tiuj malfacilaĵoj daŭre kreskos. Ja la nombro de la lingvoj, kiuj aperas sur la internacia areno, pligrandiĝas — al vivo vekiga novaj kaj novaj, en la pasinteco subpremitaj popoloj

Lingvaj demandoj

Vtolin Oljanov

LA ARTO TRADUKI

(Daŭrigo el n-ro 10)

IV

Oni ofte emfazas la logikecon de la internacia lingvo Esperanto, kiel ankau ĝian facilecon. Sed oni ja ne devas preterlasi, ke tiuj ĉi kvalitoj ne estas absolutaj, sed relativaj, kompare

al la aliaj lingvoj. Kion signifas logika lingvo? Tio signifas, ke la vortoj estas uzataj en ilia rekta kaj preciza signifo, ke la gramatiko estas regula, preskaŭ sen esceptoj, ke oni



прекрасна идея, но, уви, не приета от живота?

Планов език, т. е. такъв, основите на който са дадени от учен, може да получи право на гражданство едва в живата практика, като се утвърди в литературата и науката. Историята познава не малко лингвистични хомункулози: идо, окцидентал, интерлингва, — които така и не излязоха вън от лабораториите, останаха играчка в ръцете на любители. Друга е съдбата на есперанто. Още през 1905 г. се свиква първият конгрес на привържениците на международния език; оттогава досега са се състояли 60 такива конгреси (само международните, а националните са много повече). Хората започнали да говорят на този език и по този начин му вдъхнали живот — сега в света има милиони есперантисти. Само Международната есперантска асоциация, създадена през 1908 г., наброява в своите редове над 30,000 членове от 60 страни, като това са само активисти, хора, готови да помогнат на чуждестранните туристи в своите страни, хора, които пропагандират есперанто. В 1966 г. 72 милиона души — лично и чрез представителите на своите организации — подписаха петиция до ООН с молба да препоръча изучаването на този език в училищата.

А как сега се изучава този език? Разкажете за есперантското движение в нашата страна.

Езикът се изучава предимно в кръжоци при есперантските клубове, или пък в училищата, но като факултативен предмет. В Съветския съюз есперантски клубове и кръжоци има почти във всички по-големи градове. Цялата международна дейност на нашите есперантисти се координира от специална комисия при Съюза на съветските дружества за приятелство с чужбина. Тази именно комисия издава на есперанто художествена и политическа литература.

Съветските есперантисти участвуват в движението на привържениците на мира. През 1954 г. бе създадена нова организация — Движение на есперантистите за мир в света (МЕМ). Тя има секции в 30 страни, при което нашата, съветската, се смята за една от най-активните. През 1967 г. МЕМ се вля в Световното движение за мир, а през 1973 г. нейният ръководител, българинът Никола Алексиев, бе избран за член на Световния съвет на мира. В 1973 г. на Конгреса на миролюбивите сили в Москва се състоя среща

на делегации на МЕМ и Световния съвет на мира, начело с Ромеш Чандра. Срещата завърши с подписване на съвместна декларация за сътрудничество между двете организации с цел да се използва есперанто за обмяна на опиг между националните комитети на привържениците на мира.

Тъкмо е дума: защо есперанто се нарича спомагателен език, нима той не претендира да бъде всеобщ, световен език?

Не и не. Известният съветски езиковед проф. Е. Бокарьов подчертаваше винаги, че всеобщият език е въпрос на далечно бъдеще, а спомагателният е насъщна проблема на нашето време.

А как писателите и учените преценяват есперанто?

Този език е имал и има много привърженици, в това число Лев Толстой, Максим Горки, Анри Барбюс, Ромен Ролан, Лу Син, Иван Мичурин, Владимир Обручев и др. Що се отнася до езиковедите, още в началото на XX век се създаде клон на науката, който изучава функционирането на международния или плановия език, — това е интерлингвистиката. Съществува още Академия на есперанто, членове на която са видни съветски учени като П. Аристе, Г. Севак, В. Григориев и др.

Неотдавна Президиумът на Академията на науките в СССР възложи на Института по езикознание да проучи въпроса за спомагателния език за международно общуване, възможностите за неговото използване при съвременните условия. Създадена бе Група по проблемите на международния спомагателен език.

Тази година трудове на съветски учени излязоха в сборника „Проблеми на интерлингвистиката“. В статиите, публикувани в този сборник, те правят извода: есперанто е единственият планов език, годен за международно общуване. Учените подчертават необходимостта от по-широкото му използване, за да бъдат преодолените езиковите бариери.

А какво бъдеще Вие виждате за езика есперанто?

Есперанто не е цел, а преди всичко средство за премахване на онези трудности, което многоезичието поставя по пътя на прогреса. Ако не се обърнем за помощ към спомагателния език, тези трудности ще нарастват. Защото броят на езиците, които излизат на международната арена, се увеличава — нови, потиснати по-рано народи се пробуждат за живот.

povas nuancigi la penson per la riĉa Esperanta vortfarado, ĝustigi kaj emfazi ĝin per la libera vortordo kaj la preciziga sintakso. Sed ĉu ni ĉiam uzas la vortojn en ilia rekta preciza

signifo? Feliĉe ne! Mi diras „feliĉe“, ĉar en sia ekstremo la logikeco en la lingvo transiras en skemecon, pro kiu eco, kvazaŭ posedata de Esperanto, la kontraŭuloj atakas nin. Sed Espe-



ranto disvolviĝas laŭ la vojo de la naturaj lingvoj. Ja estas unu el la plej grandaj meritoj de Zamenhof tio, ke li lasis la lingvon disvolviĝi libere, kiel la naciaj lingvoj. Kaj se la projekto kaj la fundamento de Zamenhof estis artefaritaj, nun la evoluinta Internacia Lingvo estas jam natura, ĉar nature ĝi disvolviĝas en la praktiko, uzata de la centmiloj da esperantistoj en la tutmondo, kree aplikata de centoj da verkistoj, sciencistoj, ĵurnalistoj. Ĉiu lingvo estas influata de la ceteraj, multaj vortoj kaj esprimoj konstante transsaltas la limojn kaj iom post iom naturiĝas sur fremda teritorio. La internacia vivo tiel intensiĝis, ke tiu proceso estas nehaltigebla, malgraŭ la klopodoj de la purigistoj. Tiun influon sentas ankaŭ Esperanto, ĝi pliriĉiĝas el la trezorejo de la naciaj lingvoj kun multjarcenta vivo, kun grandega, ĉiutaga praktikado. Ni ne devas timi tiun naturan proceson, sed ĝi devas iri nome laŭ natura vojo kaj ne laŭ la bontrovo de apartaj personoj.

Laŭ tiu natura vojo venis en la Esperantan literaturon la figuraj vortoj kaj esprimoj, kiuj prezentas la unuan deflankiĝon de la severa „logikeco“. Ĉu estas krimo al la lingvo uzi tiajn esprimojn kiel „Ŝia robo flamas“, „Okcidento bruliĝis“, „La kamparo estas kovrita de blanka tapiŝo“ kaj similaj? Ĉu ekzistas mormala homo, kiu vere ekpensus, ke la robo eligas flamon, ke okcidento estas incendio kaj eble oni devas voki la fajrobrigadon, aŭ ke iu sternis veran tapiŝon sur la kamparo! Certe tia ne troviĝus, sed tiuj esprimoj estas bildecaj, ili impresas pli forte la imagon ol la „logikaj“ esprimoj, kaj ni en nenia okazo devas rezigni ilian uzadon. Sen ili ne estas ebla belarta literaturo kaj poezio.

Iu Esperanto-verkisto uzis la esprimon: „La aŭditorio kliniĝis“. Aŭskultanto (tre sperta esperantisto) protestis: „La aŭditorio ne povas kliniĝi, ja ĝi prezentas ĉambron.“ Tiu samideano ne konsentis pri la litera-

tura figuro metonimio, ĉe kiu anstataŭ la homojn ni nomas la aditorion, en kiu ili troviĝas. Same ni povas diri: „La montopinto respondis per hurao“ (t. e. la homoj, la soldatoj, troviĝantaj sur la pinto). Zamenhof ofte uzis similajn figurojn, ekzemple: „La tuta tablo eksplodis pro rido“. Neniu ja ekpensus en rekta senco, ke la ligno de la tablo ridis. Similaj literaturaj figuroj eliras el la kadro de la belarta literaturo kaj penetras en la ordinaran lingvaĵon de la homoj. Neniu jam protestas kontraŭ tiaj vortoj kaj esprimoj kiel „kapturiniĝo“, „piedoj de la monto“, „florado de la kulturo“, „okupita ĝiskape“, „rondvojaĝo“, „duonnuda“, „duonkuirita“ (kvankam eble nur kvarone, aŭ dutrione), „varma rilato“, „seka respondo“, „peza laboro“, „akra karaktero“, „kinostelo“, „staranta akvo“, „freneza ideo“, „politika tendaro“ ka. Ekzistas esprimoj, pri kiuj, se iu bulgara esperantisto ilin uzus, alia bulgaro dirus: „Tio estas bulgaraĵo. En Esperanto ne povas esti tiel“. Iam en prelego mi uzis la esprimon „trapasi la kurson“, „transiri en la duan klason“. Post la prelego venis al mi malnova esperantisto kaj diras: „Vi malkorekte uzis tiujn esprimojn. Kiel oni povas „pasi kurson“, ĉu oni marŝis en ĝi?“ Tiam mi ne sukcesis konvinki lin, sed en la Plena Vortaro troviĝas ja tiaj esprimoj kiel: „Li pasis akvon kaj fajron“, „Trapasi malfacilajn tagojn“, „Trapasi krizon“, „Trapasi ekzamenon“, „La vojo iras al la urbo“, „La muro iras de la domo ĝis la lago“, „Kiel iras la komerco“, „La heredaĵo transiris en fremdajn manojn“, „Lia senbrideco transiras ĉiujn limojn“ (Z), „Subite lia voĉo transiris en malklaran murmuradon“ (Z), „La tuta lando transiris en posedon de l'venkinto“ (Z) k. a. Ni povas diri same: „Elteni la ekzamenon“, „La faktoj parolas“, „Perdi la fadenon en la parolo“ (Z), „Mi havas sub la mano la Plenan Vortaron“ (kvankam ĝi kuŝas sur la tablo), „Teni en siaj manoj la sorton



de iu“, „La nokto falas“, „rozaj pensoj“ kaj multaj aliaj. En ĉiuj ĉi esprimoj iuj vortoj estas metafore uzitaj. En la tro ĝusta senco oni ne pasas la akvon kaj la fajron, oni ne trapasas la krizon, sed spertas malfacilajn momentojn, la faktoj ne parolas, sed indikas, li nenian fadenon perdas, sed la konsekvencon en la penso, la Plena Vortaro ne troviĝas sub lia mano konstante, sed ĝi estas ĉe li kaj ĉiam, kiam ĝi estas bezonata, li povas utiligi ĝin ktp. ktp. Per tiuj figuroj la lingvo estiĝas vigla, reliefa, fortes-prima, vivanta. Sen ili la homo ne povas imagi lingvon pretendantan esti vivirajta.

V

La esprimoj, kiujn mi montris, estas kompreneblaj por ĉiu ordinare inteligenta homo. Ĉar ja ili estas uzataj en ĉiu kultura lingvo, ne nur en la bulgara. En la nuna mondo de viglaj internaciaj rilatoj ili veturas de lando al lando, de lingvo al lingvo. Sed ekzistas aliaj esprimoj, nomataj idiomaĵoj (idiotismoj), kiuj estas netradukelblaj. La idiomaĵo estas tia esprimo, kies senco havas nenion komunan kun la signifo de la konsistigantaj ĝin vortoj. Ĝi prezentas neŝanĝeblan vortkunaĵon. En ĉiu nacia lingvo ekzistas tiaj esprimoj, formitaj dum la historia disvolviĝo de la lingvo. Pri multaj el ili estas forgesita la deveno. Kompreneble, ni ne devas traduki ilin laŭvorte, ĉar rezultus sensencaĵo. Klarigi la sencon ankaŭ ne estas bona maniero, ĉar ni perdus la figurecon, la emocian koloron, kiun ordinare ili entenas. Ni devas serĉi paralelan esprimon.

Sed Esperanto estas nova lingvo kaj en sia mallonga vivo ankoraŭ ne sukcesis krei idiomaĵojn en sufiĉa kvanto. Tio prezentas ŝtonon de falpuŝiĝo por la tradukantoj en Esperanton. Feliĉe tamen idiomaĵoj ne tute malestas. Denove ni devas danki al la genio de Zamenhof kaj ankaŭ al aliaj Esperanto-verkistoj, kiuj kreis

iajn idiomaĵojn. Ni prenu kiel ekzemplon la bulgaran idiomaĵon“. „Той си обра крyшите“. Laŭvorte tio signifas: „Li kolektis siajn pirojn.“ Sed tie ĉi ja temas ne pri piroj, sed pri tio, ke li foriris. Sed se ni tradukus ĝin tiel, ni perdus la emocian koloron, la rilaton de la aŭtoro al la persono, kiu foriris. Per tiu idiomaĵo oni esprimas malŝaton, malestimon, facilan ironion. Do ni serĉu konvenan Esperantan esprimon. Oni proponas jenan: „Li fortrotis.“ Depende de la kunteksto, de la rilato de la aŭtoro, ni povus aldoni ian adverbbon, ekzemple „malbrave“, „nerimarkite“, „fantome“ ktp., „Ще ядеш дървен господ“ (laŭvorte: „Vi manĝos lignan dion“, laŭsence: „Oni bastonos vin“) ni povus traduki per la Zamenhofa esprimo „Oni draŝos vin.“ Jen kelkaj proponoj por traduko de bulgaraj idiomaj esprimoj (unue, post la originala esprimo, en kramoj mi donas la laŭvortan tradukon kaj post la propono por traduko — en kramoj mi klarigas la sencon):

Стърже ми стомаха (Io skrapas al mi la stomakon) = Malsato tordas al mi la stomakon (Mi estas tre malsata.)

Слабо място (malforta loko) = Tikla punkto.

Мама страшно ще ме кастри (Mia patrino terure hakos miajn branĉojn) = La patrino tanos mian haŭton (riproĉos min severe.)

На него нещо му липсва (Io mankas al li) = Grilo zumas al li en la cerbo (Li estas frenezeta, havanta strangajn ideojn)

Той е на градус (Li estas je grado) = Li havas iom da vaporo en la kapo (estas ebrieta.)

Врял и кипял (Bolinta kaj superbolinta) = Li estas frotita kaj polurita (tre sperta, multon travivinta).

От трън та на глог (de dorno al

kratago)= Fali de sitelo en barelon (Z) (De unu malbona situacio iri al alia, pli malbona).

Разправя бабини деветини (Lirakontas avinan rekviemon.) = Ĝpini aerfantaziaĵojn (Paroli elĉenasĵojn.)

VI

Zamenhoj bone komtrenis la rolon de similaj esprimoj, belartaj figuroj, sentencoj kaj proverboj kiel freŝigiloj, beligiloj de la lingvo kaj verkis sian faman „Proverbaron“. Ĝi prezentas riĉan fonton por kolorigo de la lingvo, por esprimado de popolaj saĝaĵoj kaj fortan helpilon por la tradukistoj. Tie ĉi mi montros kelkajn pli ofte uzatajn esprimojn:

— Teksto farĉita per ŝablonaj esprimoj.

— Li trapasis la severan lernejon de la vivo.

— Ligi la manojn al iu (senigi iun je libera agado).

— Teni en siaj manoj la sorton de . . .

— Varmege roŝtas la suno.

— Rozaj pensoj.

— Dolĉe ŝmiri al iu la lipojn (multe promesi al iu).

— Butonumi iun malvaste (teni iun severe).

— Mieno taŭzita de teruro.

— Nuksoj venis, kiam dentoj elfalis.

— Draŝi fojnon (vane peni).

— La vermoj frandu lin.

— Tro da kuiristoj kaĉon difektas.

— Ekkapti iun kun la peko en la mano.

— Kiel per turno de la mano ĉio forpasis (rapidege, subite).

— Obstina kiel mulo.

— Sovaĝtorenta pluvo.

— Kiu bone ŝmiras, bone veturas (kiu subaĉetas, tiu prosperas.)

— Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon!

— Malsaĝa kiel ŝtupo.

— Per unu ŝtono oni du ĵetojn ne

faras (por sukcesi oni ne devas strebi al multaj celoj).

— Vivi inter forno hejtgita kaj tablo kovrita (vivi sate kaj trankvile).

— La tero estis tapiŝita de floroj.

— Torni belsonan frazon.

— Havi truon en la manĉato (troa malavarulo, prodigulo).

— Batadi la venton (vane kloĉodi).

VII

De la ĝistiea ekspono estiĝas klare, ke la tradukado estas tre komplika, pensa kaj verka proceso, ke traduki eĉ en Esperanton estas sufiĉe malfacila afero. Oni devas tre bone koni ne nur la lingvon, sed ankaŭ ties literaturon, la verkojn de Zamenhof, aparte la proverbaron, posedi mem bonan stilon. Oni devas tre bone koni la tradukotan verkon. Ĝi devas esti nepre anticipe tralegita, analizitaj la enhavo kaj la stilo, markitaj iuj apartaj kaj specifaj vortoj kaj esprimoj.

Kompreneble, oni devas bone regi ne nur la lingvon, en kiun, sed ankaŭ el kiu oni tradukas. Alimaniere povas rezulti malĝustaĵoj kaj eĉ ridindaĵoj. Tiaj ridindaĵoj kelkfoje aperas en la tradukoj el la rusa lingvo en la bulgaran, ĉar la rusa estas parenca al la bulgara, kaj multaj bulgaroj, eĉ ne havantaj la necesajn konojn pri la rusa lingvo, okupiĝas pri tradukado. Foje ekzemple aperis tia frazo: „La kolhozo iris en la monton.“ Sed la tradukaĵo ne estis fabelo kaj do la kolhozo ne havis tian kapablon promeni al la monto. La kaŭzo de la ridinda traduko estis alia: la tradukisto ne sciis, ke la rusa idiomaĵo „iri en la monton“ signifas „progresi“, „supreniri“, „disvolviĝi“.

Ĉe faka teksto estas rekomendinde, ke la tradukanto estu fakulo de la sama scienca aŭ teknika sfero. Se la teksto estas belarta, la tradukanto devas havi kvalitojn de verkisto.

En ĉiuj okazoj la tradukistoj devas posedi sufiĉe vastan ĝeneralan kulturon kaj aparte lingvan kulturon. Ju pli da



lingvoj oni regas aŭ lernis, des pli facile kaj trafe oni solvos diversajn malfacilajn kazojn dum la tradukado. Gravan rolon en tiu komplika proceso ludas la bona regado de la gepatra lingvo.

Kiom ajn scipovanta tamen estas la tradukanto, li neniam devas kuŝi ekskluzive sur siaj scioj. Submane li ĉiam devas havi bonajn, fidindajn vortarojn de ambaŭ lingvoj, enciklopediojn, gramatikajn, ortografiajn kaj fakajn helpilojn.

Aparte utilaj helpiloj por la tradukisto estas la paralelaj frazaroj, sinonimaj kaj dialektaj vortaroj, la rimvortaroj. Eĉ tute konatajn vortojn oni devas kontroli pri iliaj sencaj nuancoj kaj signifoj por la konkreta kazo, pri iliaj gramatikaj funkcioj. Oni neniam forgesu, ke la tradukado estas arto, estas komplika mensa proceso, ke ĝi bezonas vastajn sciojn kaj kulturon. Por estiĝi bona tradukanto estas necesa tre longa antaŭprepara laborado, persista ekzercado.

Gastas al ni „Der Esperantist“

„Der Esperantist“ estas organo de la esperantistoj en Germana Demokratia Respubliko. En ĝi oni ĉiam povas trovi interesan, varian kaj valoran materialon. Ĉi tie estas artikoloj je politikaj kaj kulturaj temoj, intervjuoj kun elstaraj sciencistoj kaj sociagantoj pri Esperanto, novaĵoj el la E-vivo en GDR kaj eksterlande, belartaj materialoj, recenzoj, humuraĵoj ka. Aparte notindaj estas la lingvaj kaj lingvistikaj materialoj, kiujn la revuo disponigas al siaj legantoj. Tre utilas ankaŭ la konstanta rubriko „koresponddeziroj“, kiu regule havigas adresojn de korespondemuloj.

„Der Esperantist“ aperas 6-foje dum la jaro.

Ni varme rekomendas la revuon al la bulgaraj esperantistoj. Ĉiu povas aboni ĝin sendante per poŝtmandato la abonkotizon de 2 levoj al: *ENJO DASKALOV, BUL. LENIN 19, AP. 40, 3 000 VRACA.*

Prof. Walter Bartel

LA MURDO DE ERNST THÄLMANN, LA GVIDINTO DE LA GERMANA KP

La antifaŝistoj de la koncentrejo Buchenwald scias pri multaj mortigoj fare de SS — la speciala taĉmento de la faŝista ŝtato. La ekstermo de judaj civilanoj, la laŭplana nuligo de polaj kaptitoj okazis ĉiutage. Kun indigneco ni devis konstati la diablan murdon de 8000 sovetaj kaptitoj laŭ la t. n. nuka pafmortigo. Kaj krom tio la ĉiutaga murdo: pafmortigita de SS, dispecigita per piedpremado, mortigita, sufokita, venenita, injekta per malsaigaj medikamentoj, pereigita per malsaio kaj epidemio. Jen la sorto de patriotoj el 32 eŭropaj landoj. Sed se oni demandus politikan kaptiton de Buchenwald, kiu tago estis la plej nigra en la historio de tiu koncentrejo, tiam li senhezite respondos: la 18-a de aŭgusto 1944.

En la unua horo de tiu tago SS-taĉmento en la kremaciejo de Buchenwald pafmortigis E. Thälmann (Telman) embuske de malantaŭe. Kelkajn horojn antaŭe venis telefona ordo de la Regna Ĉefsekurejo al la komandanto de Buchenwald, Pister, ke li ekhejtigu la fornon de la kremaciejo por meznokto. La tie okupitaj kaptitoj estis kazernigitaj en siaj loĝejoj. Anoncita estis la alveno de du anoj de la Regna

Ĉefsekurejo. Ili alportis kaptiton, kiu tuj devis esti ekzekutita. Kiam la anoncita transporto alvenis en Buchenwald, en la korto de la kremaciejo kunvenis la SS-oficiroj Otto, Gust, Hoschulte, Warnstedt, la adjutanto de la komandanto Schmidt, la SS-kuracisto de la koncentrejo Schiedlausky, la SS-oficiroj Berger kaj Stoppe. El la aŭtomobilo aperis tri civiluloj. La viro en la mezo, granda, larĝsultra, sen ĉapelo, kalva, devis iri antaŭen kaj tuj ekkrakis tri pafoj el pistoloj, post duona minuto sekvis kvara, verŝajne la mortiga pafo. Tiamaniere finiĝis la vivo de la estro de la Komunista Partio de Germanio, Ernst Thälmann, sub la kugloj de la SS-murdistoj.

Ni, politikaj kaptitoj, aŭdis dum tiu nokto, ke E. Thälmann estis pafmortigita en la kremaciejo. Sed la fontoj estis malklaraj: oni diroj trakuris ĉiutage la koncentrejon. Oni ne volis kredi la teruraĵon.

La bombatako de la amerikanoj kontraŭ la armilaj laborejoj en la koncentrejo kaŭzis la morton de 400 kaptitoj. Multaj devis morti, ĉar SS pafmortigis la kaptitojn, kiuj serĉis protekton en la proksima arbaro.

Inter tiuj mortigitaj troviĝis Rudolf Breit-

sceid, la estro de la socialdemokrata frakcio en la germana parlamento.

Sed kio estis kun E. Thälmann? Nia esplora servo ĉiam venigis novajn faktojn, kiuj finfine supozigis la mortigon. Tri semajnojn la nazia registaro silentis. Nek unu vorto pri la mortigo de E. Thälmann, nek unu vorto pri la pereco de R. Breitscheid.

Fine, la 16-an de septembro 1944, „Völkischer Beobachter“ — la centra organo de la nazia partio, publikigis mensogan informon „Koncentrejo bombardita“: „Dum terora atako al la ĉirkaŭaĵo de Weimar la 28-an de aŭgusto 1944 estis trafita ankaŭ la koncentrejo de multnombraj eksplodiloj. Inter la pereintaj kaptitoj troviĝis ankaŭ la iamaj parlamentaj deputitoj Thälmann kaj Breitscheid.“

Tio estis triobla mensogo. Unue, la bombatako ne okazis kontraŭ la ĉirkaŭaĵo de Weimar, sed kontraŭ la armilaj laborejoj de la koncentrejo de Buchenwald; due, estis falsita la dato kaj, trie, dum la bombado pereis nur Breitscheid kaj ne Thälmann.

SS-ulo cinike komentis al unu de niaj kamaradoj, ke Thälmann jam estis mortpafita en la kremaciejo kelkajn tagojn antaŭ la bombatako kontraŭ Buchenwald.

Ne plu ekzistis dubo: Ernst Thälmann ne plu vivas, pafmortigita de SS. Tiu sciigo rapide trakuris la koncentrejon. Ni, germanaj antifaŝistoj, profunde emociitaj pro la murdo, travivis laŭ la cirkonstancoj en koncentrejo, respektan kondolencon. Eksterlandaj kamaradoj, antifaŝistoj el multaj eŭropaj landoj, premis niajn manojn kun funebra mieno kaj nur di-

ris unu vorton: „Thälmann!“ Ni sentis la estiman respekton kaj amon al nia kamarado, la funebtron pri lia morto, sed ankaŭ la firman decidemon pli forte daŭrigi lian batalon. La kamaradoj de la vespa labortaĉmento organizis funebrian manifestacion en la desinfekteja kelo. La ejo estis dekorita per nigra kaj ruĝa ŝtofoj. En la fundo de scenejo staris rapide farita bildo de Thälmann. Tiun manifestacion partoprenis 90 kamaradoj el preskaŭ ĉiuj regionoj de Eŭropo, okupitaj de la nazioj. Willi Bleisher, post 1945 longjara estro de la metal-singikato de Württemberg-Baden, inaŭguris la manifestacion. Robert Siewert, poste alta funkciulo en la Germana Demokratia Respubliko, diris la memorigajn vortojn. Funebran marŝon ludis violonisto kaj la ĉeestantoj mallaŭte kunkantis la saman melodion. Kamarado Karl Schnog deklamis. Finfine oni komune kantis la „Varŝavjanko-n“. Per fermita, levita pugno la anaro restis en kelkminuta silento. Sed ankaŭ kaŝe enviciĝis spiono. Li perfidis la aranĝon al SS, sed ne povis diri iujn nomojn. SS arestis trafe maltrafe kaptitojn el la vespa labortaĉmento, inter ili Robert Siewert kaj la estron de la kaptitoj, Erich Reschke. Ili estis fitraktitaj de SS. Sed ili silentis. SS ne eksciis, kiu apartenis al la neleĝa estraro de la germana kaj internacia rezista movado. La batalo estis daŭrigita. En la spirito de Ernst Thälmann ni preparis nin por la liberigo el la teroro de la faŝistoj.

El „Der Esperantist“ n-ro 2/1976

DEZIRAS KORESPONDI

AŬSTRIO

Franz Quietensky — S. Schreiber 16, A 26 40 Gloggnitz.

BULGARIO

Kontraŭ bela bildkarto vi tuj ricevos similan pri Bulgario. Skribu al: Esperanto-societo, str. Ivanica Dančev 27, 5250 **Sviŝtov**.

Georgi Libanov — Kostandovo, **Pazarĝiŝko** (50-jara laboristo — kun ĉel pri ĉel).

Asen Ĥr. Josifov — str. Vladimir Poptomov 23, **Sofio** (lingvoinstruisto — kun ĉel pri ĉel).

Kornelija Miĥajlova — kv. Iztok, bl. Ela, vĥod II, 7 005 **Ruse** (27-jara instruistino — kun ĉel pri ĉel).

Georgi Lazarov Petrov — **Momina Klisura, Pazarĝiŝko** (kun ĉel pri ĉel).

Cvetelin kaj Angel Angelovi — str. Trepetlika 12, 1407 Sofia (pri ĉel kun japanoj, germanoj, italoj, hungaroj, svedoj, francoj, usonanoj).

ĈEĤOSLOVAKIO

Vladimir Ryš — 723 00 Martinov ĉ. 13,

Ostrava (30-jara — kun ĉel, kolektas bankbiletojn, monerojn, insignojn, pm).

GDR

Nova E-grupo deziras korespondi tutmonde pri turismo, literaturo, floroj, interŝanĝi pm, bk, fotojn. Komuna adreso: Helmut Rieche — Ehrlichstr. 28, 435 **Bernburg**.

HUNGARIO

Junulara E-klubo deziras korespondi kun bulgaraj gejunuloj. Skribu al: Esperanto-Klubo „Juna Koro“, H-8900 **Zalaegerszeg** Kisfaludi u. 5—7.

Mihaly Lada — H-1103 **Budapest**, X Öhegy str. 11(72-jara — kun gebulgaroj).

Eva Kovacs — 3300 **Eger**, Karoly M. ut. 8/a (21-jara studentino — kun gebulgaroj).

Uzina E-klubo deziras estigi kontaktojn kun socialismaj brigadoj, laborgrupoj kaj apartaj kolegoj, kiuj laboras en fervojoj kaj fervojtransportaj fabrikoj. Komuna adreso: Sándor Kovacs, „Interklubo“, Fervoja Esperanto-grupo, H-1045 **Budapest**, St. Elem — 5—7, MAV-Lander Uzem.



VERDAJ STELETOJ

Elvira Lippe

MIA STELO

Dum nokthoroj sur ferdeko
ekkonis multajn stelojn mi,
kaj ravis min trembril' ilia,
arĝenta bel' kaj harmoni'.
La galaksion dum aŭtunoj
transkuris brila mat' or'.
Kortuŝa bel', sed pli ŝatata, —
la verda stel' en mia kor'.

Dum ŝtorma nokt' en nigra spaco,
ne trovis stelojn la okul',
sed konis mi iliajn lokojn
malantaŭ nuboj kaj nebuloj.
Sur furioza maro ŝajnis: —
mallumo d' ŝtelo sen aŭror'.
Nur unu stel' al mi radiis —
la verda stel' en mia kor'.

Mi transveturis ekvatoron.
Akceptis fremde min ĉi tie.
El fora biu' al mi ridetis
ne unu korproksima stel'.
Glacie brilis fremdaj steloj,
mi frostis pro ilia ar',
sed kiel feno min varmigis
la verda stel' en mia kor'.

Geza Bikfalvi — H-1116 Budapest, Sopron
ut. 11/51 (19-jara — kun junaj gebulgaroj pri
literaturo, artoj, muziko, lingvoj kaj).

Imre Bauk — H-40 2 Debrecen, Karács u.
38 sz. (21-jara — kun samaĝaj bulgaroj).

Gabriel Nagy — 1156 Budapest, Hevesi
Gy. ut. 72. 2. 10. (21-jara fabriklaboristo —
folkloro, politika vivo kaj).

Francisko Szabó — H-2500 Esztergom, Monte-
terciario u. 4 (emerita ekslerneja ro — kun
bulgaroj).

Vadocz Erzsebet — 1144 Budapest, Gva-
dányi 32—34, T. 23 (27-jara studento).

Margit Süő — 4400 Nyiregyhaza, Josa-
varos, Eperjes ut. 2. III. 10 (18-jara lernan-
tino — kun gebulgaroj).

KANADO

Gastao Florencio — 469 Hyman Drive,
Dollard des Ormeaux, Kvebek (portugaldevena —
kun gebulgaroj).

KOLOMBIO

Gustavo E. Ochoa H. — Santa Fe de Anti-
oquia, Ant. Kolombio.



Komence de tiu ĉi lernojaro kara gasto al la
120 junaj esperantistoj en lernejo „Šandor
Petjofi“ en Ĥaskovo estis Tolnaj Laslo el
Hungario. Sur la foto: s-ano Tolnaj inter
infanoj, kiuj korespondas kun junpioniroj el
lia naskiĝloko Tokod Altaro.

LA HOMA KORPO

La ekonomia stato de iu ajn popolo ha-
vas senperan influon sur ties fizikan disvol-
viĝon kaj precipe sur la homan staturon.
Laŭ la ŝanĝoj en la staturo oni povas juĝi
ankaŭ pri la ŝanĝoj, kiuj okazis en la soci-
ekonomia disvolviĝo de la lando.

Tiun ĉi aserton konfirmas ankaŭ iuj
observadoj rilate la staturon de la bulga-
roj.

Fine de la XIX kaj komence de la XX jc.
(1897—1901) en nia lando oni faris pristu-
dojn de la staturo de la bulgaraj 18-jaraĝaj
junuloj kaj oni konstatis, ke ĝi estas meze
166 cm. En tiu ĉi tempo nia popolo laŭ
la akceptitaj klasifikoj (Martin) apartenis
al la malal staturaj popoloj. La esploroj en
1964 j. konstatis, ke la bulgaraj junuloj
de la sama aĝo havas mezan staturon de
168 cm aŭ dum 64 jaroj ilia staturo pli-
grandiĝis nur je 2 cm.

En 1974 j. estis faritaj novaj esploroj
pri la staturo de la 18-jaraĝaj junuloj.
Oni konstatis, ke la meza alteco estas
170 cm. Tio signifas, ke nur dum 10 jaroj
(de 1964 ĝis 1974) la staturo de tiuj ĉi ju-
nuloj kreskis ankaŭ je 2 cm, kio prezen-
tes kreskon de pli ol du fojoj laŭ la indikitaj
normoj. Dum tiuj ĉi jaroj — kompare mal-
longa periodo — la bulgaroj alproksimiĝis
konsiderinde al la altstaturaj popoloj.

Tiuj ĉi rapidaj ŝanĝoj de la staturo de la
bulgaro estas eksplikataj per la rapida
plialtiĝo de la ekonomia nivelo de nia popolo.

UBO

Felipe Felipe — Calle 23 n-ro 1613 apt. 31 e/28 y 30 Vedado, **Habano** 4(27-jara — kun ebulgaroj pri popolkutimoj, pm, bk, sondiskoj).



PERUO

Sur la foto:

Pedro I. Nunez — Apartado Nr. 163, Gajmarka Peru (profesoro de filozofio — kun junaj fraŭlinoj el socialismaj landoj).

POLLANDO]

Teresa Nuvariska — 02—934 Warszawa, ul. Spalska 5 m. 24 (bk, fotoj de kantistoj, muziko ka.).

Marek Truszkowski — 09—500 Gostynin, ul. Czerwinska 39, woj. Plocka (15-jara — muziko, historio ka.).

Gos Maria — 78—311 Rusinowo (20-jara poliro — sporto, muziko, fotoj).

Mieczyslaw Porowski — ul. Dambonia 133/15, 45—774 **Opole** (30-jara, — kun ĉiuj landoj pri muziko, turismo, pm, bk, gram. diskoj).

Lchislaw Berent — ul. I. Dabrowskiego 0-a, 92—277 **Łódź** (20-jara — pri numizmatiko, 4junulara muziko ka.).

Danuta Zarebczan — Bor 39, 34—424 p-ta Szaflary, woj. **Nowy Sonez** (kun junaj gebulgaroj).

Halina Lachowicz 42—400 Zawiercie, ul. Pszczelna 7 (22-jara studentino — kun ĉl).

Grazira Średziawa — ul. Barska 57/3, 30—307 **Krakow** (16-jara).

Elżbieta Chrzarczewska — ul. XX — lecie PRH 12/64, 10—457 **Olsztyn** (18-jara — bk, moderna muziko ka.).

Daruta Lergota — 07—320 **Malkinia** — Przewoz 11, woj. Ostrolenka (instruistino — kun bulgaroj).

Wolf Malgorzata — Flokinia Kościelna 92, 62—860 **Opatówek**, woj. Kalisz (18-jara — kun gebulgaroj — junulara muziko, bk, pm, pupoj, dram. diskoj).

Czesław Pietrusiak — ul. A. Czecha 3, 41—200 **Sosnowiec** (26-jara — turismo, literaturo, muziko, filmoj, bk).

RUMANIO

Bögözi Csaba — 4150 Oderheiu — Secuiesc, str. Lenin 6, bl. a 3, ap. 15, Jud. Harghita.

SOVETUNIO

Kudinov Nikolao — 262001 **Luck**, str. Ševčenko 45, kv. 2 (20-jara — kun ĉl pri lingvoj kaj jogismo).

Nova Esperanto-rondo de studentinoj de medicino (19—21-jaraj) ĉez. korespondi tutmonde.

Komuna adreso: 235 300 Medicina Le^{no}, e⁷ Esperanto-rondo, str. Sodu 10, **Panevejšs**, Litovio.

Aita Saad (37-jara laboristino) kaj Rein Saag (40-jara radioteknikisto) — geedzoj — ĉez. korespondi kun ĉl pri E-movado, E-literaturo, bk, pm. Adreso: Estonio, 202 600 **Polva**, str. Pionieri 9—3.

Ella Kurisoo — 203 504 Jarvakandi Uus 8—2, Estonio (50-jara — kun ĉl pri ĉt).

Tiiu Kallaste — 203 504 Jarvakandi, 1 Mai 4—5, Estonio (31-jara fotoamatorino — kun ĉl pri ĉt).

Olga Zaharova — p. k. 21, 300 000 Tula (kun ĉl pri ĉt).

E-klubo de lernantoj (14—16 jaraj). Komuna adreso: Valdur Randmäe, Jakobsoni 36—2, 202 900 **Viljandi**, Estonio.

Regina Tutinieme — str. Debrecen 28—12, 235 811 **Klaipeda**, Litovio (kun ĉl pri ĉt).

TRA LA GAZETARO

En ĵ. „**Vitoša**“ ĉe uzino „Vitoša“ — Sofio (3. IV. 1976): artikolo de Petro Popnikolov „Lernu Esperanton!“

En ĵ. „**Borba**“ — u. Veliko Târnovo (17. IV) informo pri la gazetara konferenco lige kun la okazonta celebrego de 80-jariĝo de la loka E-Societo „Lumo“.

En la sama ĵurnalo (11. V.): artikolo „Esperanto en la batalo por la paco“ de Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA kaj MEM.

En la sama ĵurnalo (18. V.): informo de Donka Hristova pri la solenaĵo okaze de la 80-jariĝo de la loka E-Societo „Lumo“; artikolo de Stefan Conev „Admirinda esperantisto“ — pri la E-agado de d-ro Vârban Genčev, pereinta en la kontraŭfaŝisma batalo.

En ĵ. „**Elenska Tribuna**“ — u. Elena (20. IV): „Esperanto disvolviĝas kaj pliriĉiĝas“ — intervjuo kun la korata bulgara esperantisto Simeon Hesapčiev, prenita de Sava S'arev.

En la uzina ĵ. „**Avtostroitel**“, uzinoj „Mada“ — Ŝumen (30. IV): informo pri E-kurso en la uzinoj.

En gazeto „**Filatelen Pregled**“, n-ro 4: recenzo ĉe Ivan Peev pri la libro „Esperanto en la filatelo“ de L. Levičarov kaj S. Pagani.

En la sama gazeto, n-ro 6: la salutparolado de N. Aleksiev, prezidanto de BEA, al la XII-a kongreso de la Unuiĝo de Bulgaraj Filatelistoj.

En ĵ. „**Narodno Delo**“ — u. Varna (21. V): sciigo pri okazonta partopreno de la lokaj esperantistoj en la manifestacio lige kun la Festo de la Popola Klerigo (24-a de majo).

En la uzina ĵ. „**Sviloza**“, kemiaj uzinoj en u. Svištov (29. V): informo pri la partopreno de la uzinaj esperantistoj en la jubileaj solenaĵoj lige kun la tutpopola celebrego de la Aprila Ribelo.

